

LINGVA PROBLEMO SOLVITA aŭ nur KARNAVALA SERCO.

Antaŭ nelonge okazis rutina sesio de la Eŭropa Parlamento. La paroladoj fariĝis iomete tedaj kaj enuigaj. Ne ĉiuj parlamentanoj komprenis la oratorojn, kvankam ili ja havis siajn kutimajn aŭdigilojn - eble, iuj sentis kapdoloron kaj formetis ilin - aŭ eble ili tiklis la orelojn. Fakte ĉiuj jam pensis pri la baldaŭ komenciĝontaj festoj kristnaskaj, kelkaj oscilis ... En tiu momento, neatendite, itala deputito perdis la paciencon kaj komencis paroli, ne itallingve, sed en klasika latino! Instante la deputitoj vekigis el la dormiga atmosfero kaj la aŭskultantoj estis ŝokitaj. Ion tian ili ne atendis. Estis tiel silente, ke eĉ falintan pinglon oni estus aŭdinta. Sed tio ne estis la kulmino. Iom poste leviĝis alia deputito kiu respondis ankaŭ latine!! La surprizo estis kompleta. Jen, la longatendita solvo de la babelo, lingva konfuziĝo! Kompreneble, ke ambaŭ oratoroj rikoltis tondran aplaŭdon. La deputitoj ekstaris, senfine klakigis la manojn, gratulante la kuraĝajn virojn, kiuj aŭdacis krevigi la lingvajn kateĵojn. Tio, kio okazis en la Eŭropa Parlamento, ne estis karnavala ŝerco, sed fakta okazintaĵo. Multaj eŭropaj ĵurnaloj skribis pri ĝi.

+++++

'LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO':

Antaŭe: 'LA MONDA LINGVO-PROBLEMO'

Estas grava anonco por abonantoj: Ekde Vol. 4, n-ro 1, ĉi tiu revuo aperados ĉe la Eldonejo de Universitato Texas. Novaj abonprezoj estas \$12.00 jare por individuoj kaj \$20.00 jare por institucioj. Demandojn pri abonoj, malnovaj numeroj, reklamado, ktp. bonvolu sendi al:

University of Texas Press, Journals Dept.,
P.O. Box 7819, Austin, TX78712, Usono.

Plendojn pri neliveritaj ekzempleroj bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ al: Walter de Gruyter & Co. KG, Genthiner Str.13, 1 Berlin 30, FR Germanio.

+++++

LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P.O. Box 1227, Cape Town.

PREZIDENTO: s-ro E. de Kock.

VIC-PREZIDENTO: s-ro A. von Blottnitz.

SEKRETARIO: s-ro O. Sher.

KASISTO: s-ro C.S. Beckford.

KOMITATANOJ: s-ino A. Fouché; s-roj H.W. Appel,
J. van D. Strydom, F.M. Woolf.

ENHAVO

Lingva Problemo Solvita	1
Estraro	2
Cefartikolo	3
UN kaj Ni: Homaj Rilatoj	4
Rememoroj de Manibic	5
Pri la Bonkoreco de Zamenhof	6
Safario en Afriko	7
Trilingva)	8
Artikolo)	9
Esperanto Novaĵoj	10
Venteraĵoj	11
Tra la Mondo	12
La Nacia Plado de Nederlando	13
s-ro A. von Blottnitz: Biografieto	14
Donaco de Libroj de s-ro Semmelink	15
El Nia Gramatiko/Lingvo	16

(Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT, 8060;
tel: 44.2657; helpe de s-ro C.S. Beckford; tel:
22.6326; hejme: 77.0588).

Sekve de tre maltrankviliga informo de li ricevita, nia Vicprezidento, s-ro A. von Blottnitz, komence de Aŭgusto sendis telegramon al UEA, Rotterdam, kiu tekstis jene:

ESPERANTO ROTTERDAM

BRAZILIO NE ENLASAS SUDAFRIKANOJN POR KONGRESI. MIA ALIĜMENDO PASINTMONATA POR VENONTA MONDKUNVENO ESTAS KONDICE, KE SUDAFRIKANOJ RICEVOS VIZOJN. ALIE NI PROPONAS SANGON DE KONGRESEJO AŬ CEDON JE MALNEŬTRALECO. KONTO BLOTTNITZ

Jen vi havas! Neniu klarigo necesas - la enhavo diras ĉion, kion oni devas scii, aŭ povas dedukti. Do eĉ ni, la sudafrikaj Esperantistoj, kiuj tute eble kaj kompreneble rajtas pensi, ke "al ni tio ne povas okazi, tio ne povas iel tuŝi nin", ankaŭ ni nun troviĝas inter la elpelitoj, parioj de la komuna societo de ordinaraj homoj, eĉ de tiuj, kiuj nomas sin Samideanoj. Je la sankta nomo de la Neŭtraleco, kiu laŭdire apartigas kaj identigas nin disde ĉiuj aliaj internaciaj organizaĵoj - eble escepte de Unesko - kiom nun helpas la tielnomata Internacieco de UEA, se eĉ niaj propraj "familianoj" rifuzas akcepti nin? S-ro von Blottnitz petis aliĝon al la Brazilia U.K., ne kiel sudafrikano, sed kiel Esperantisto, kaj se la tiulanda registaro ne komprenas la subkuŝantajn principojn regantajn nian universalan Asocion, ni forte rekomendas, ke ili senprokraste konatiĝu kun tiuj principoj kaj akompanantaj idealoj. Alie ili riskas perdi la subtenon, moralan kiel ankaŭ fizikan, de nekonata nombro de pluaj, bonintencaj aliĝontoj al la venontjara kongreso Brazilia. Ĉu ĝi ne estas aksiomo, ke la U.K. devas trovi lokon nur tie, kie la gastiga lando akceptas ĉiujn bonfidajn kongresantojn senrezerve kaj senescepte? Se la Brazila registaro estas patrono de la 66a U.K., kiel okazas, ke ĝi, la gastiga lando, povas alie ol obei, morale kaj spirite, la konstitucion de UEA kaj ties principojn? Cedi al la rifuzo akcepti sudafrikajn Esperantistojn pro la tipo de politiko nun reganta en ilia lando signifas permesi subfosi la neŭtralecon de UEA, ion kion tiu ĉi tiel ĵaluze prizorgas kaj nutras, ĉar sur tiu principo estas bazita la statuto de UEA. La afero devas esti kontentige akordigita sen ia prokrasto.

(Pro la gravaj implikoj kaj eble seriozaj sekvoj, rezulte de la rifuzo de vizo kiel ĉi-supre priskribite, kaj ĉar la tempo tiel urĝas, ni aperigas la Oktobran numeron de B.E. jam nun esperante, ke per tio la koncernaj instancoj faros siajn devojn en la ĝustaj direktoj kun komprenemo kaj bonvolo. - Red.)

Unuiginta Naciaro redaktas paĝojn de taggazetoj de la mondo por influu la mondan opinionon.

Supozeble pluraj el ni jam legis artikolojn en sia nacia taggazeto, redaktitajn de UN. La redakto fare de UN komenciĝis en Junio 1979a kaj daŭras ankoraŭ nun, kun la eldonritmo kvaronjara.

La afero okazas tiel: UN kaj ĝiaj institucioj kaj naciaj taggazetoj kunlabore kompilas artikolojn pri difinitaj temoj por samtempe en la mondo aperigi la samajn artikolojn en nacilingvoj en grandaj taggazetoj. La 1a eldono tia okazis en Marto 1980a en 15 taggazetoj el 15 tre diversaj landoj. La tiama temo estis: komunikado kaj edukado. La naciaj 15 gazetoj dediĉis plurajn paĝojn por tiel kune redaktitaj artikoloj.

Tia entrepreno markas historian etapon de la homara kunlaboro sur la amaskomunikilo tutmonda. Laŭ la nuna situacio, la fenomeno ne estas tutmonda. Ne ĉiuj landoj povas samtempe kunagi. Nur selektitaj gazetoj kunlaboras por iu difinita fojo. Tamen, la celo de UN certe estas vekti la teranojn pri komunaj mondaj problemoj kaj igi ilin konsciaj pri la interdependeco.

La motivo de tiu iniciato estas, ke necesas malaperigi mal-ekvilibroj inter la Nordo kaj la Sudo en la senco de la ekonomio kaj en la fluoj de informoj. Proksimume 80% de la novaĵoj por la amaskomunikiloj nuntempe venas el Londono, Novjorko kaj Parizo; sekve, novaĵoj ofte ligitaj al Eŭropo kaj Usono.

La provo de UN estas do laŭdinda, kiel paŝo al la homara solidareco. Ni esperu, ke iam UN eldonos eĉ propraforte mondan gazeton kaj disaŭdigos novaĵojn televide en la lingvo internacia, kvankam pli granda estas la ŝanco, ke iu komerca gazeto aŭ televidinstanco prenos sur sin tian rolon. **

(El UN kaj NI, No. 18).

ETAJ PENSOJ PRI INTERHOMAJ RILATOJ.

La SES plej gravaj vortoj: Vi bone sukcesis fari la taskon.

La KVIN plej gravaj vortoj: Mi konfesas, ke mi eraris.

La KVAR plej gravaj vortoj: Kio estas via opinio?

La TRI plej gravaj vortoj: Bonvolu, mi petas.

La DU plej gravaj vortoj: Mi dankas.

La UNU plej grava vorto: Ni.

La PLEJ MALGRAVA vorto: Mi.

+++++

Mi la unuan fojon ekvidis la Namibion de la ferdeko de malgranda sed tre komforta germana pasaĝerŝipo kiu, survoje al Eŭropo antaŭ 50 jaroj, portis min de Port Elizabeth al Walvis Bajo. Tra la frumatena nebuleto la ŝipo drivis lante kaj zorglibere sur milda ŝvelo al horizonto de malaltaj dunoj, kiuj etendiĝis laŭlonge de la marbordo, ĝis ili paliĝis en la nebuleton. Grade ebligis distingi kajon kaj kelkajn malgrandajn konstruaĵojn. Dunoj, de oro palflava ĝis malhela, plenigis la horizonton. Ĝi estis impona sed timiga vidaĵo.

Miaj kunpasaĝeroj kaj mi estis rigardantaj la tutnudan pejzaĝon kiam unu el ili diris al mi: "Je ĉielo, ĉu vi vere intencas vivi tie"? Kaj kvankam mi senzorge respondis "Ho, jes", mi komencis demandi min ĉu mi vere estis tiel saĝaca, akceptante la translokiĝon, kiun mia dunganto, la banko, al mi proponis. Tamen, mia vera celo estis Swakopmund, ĉirkaŭ 30 kilometrojn norden, kaj ĝustadire, mi kun anticipo jam antaŭĝojis pri mia estonta restado tie.

Post kiam ni endokiĝis la ŝipkasisto prezentis min al amika, juna ŝipagento, kiu min informis, ke pro densa pluvo regiona, la Swakop rivero inundis la kamparon, sekve ne troviĝis rimedoj atingi Swakopmund, aŭ vojire, aŭ fervojire. Sed mi konatiĝis kun fama aviadisto, Gordon Store, kiu diris, ke li volonte alportos min al Swakopmund per sia malgranda aviadilo. Tiutempe ne ekzistis flugokampo ĉe Walvis Bajo; li do surteriĝis kaj ekflugis de sur la apuda plaĝo! Tamen, ne estis permesite kunpreni kiun ajn pakaĵon krom niaj privataj referaĵoj; sed mi iel ja rajtis reteni mian ĉapelon!

Ĉar li devis atendi taŭgan tajdon kaj antaŭ ol denove ekflugi, Gordon sugestis, ke mi restu sur la ŝipo kaj aliĝu al la festeto ĵus aranĝita. Tuj mi sciigis, ke en la salono la festeto estas jam en plena funkciado. La juna ŝipagento ekvidis min kaj tuj komencis prezenti min al ĉiuj. Oni min informis, ke kiam tia ŝipo vizitas la Bajon, kaj se ĝi estas sufiĉe malgranda por endokiĝi, (ordinare ĉiun trian monaton), la plejparto de la lokaj aferistoj subite rememoras, ke ili devas prizorgi iujn gravajn aranĝojn ĉe la kajo. Ili do tre agrable pasigis en la salono la kvin aŭ ses horojn de la vizito, celebrante la antaŭajn kaj ankaŭ venontajn naskiĝtagojn de siaj amikoj!

Kiel nova "enmigranto" mi ricevis koregan bonvenon kaj post nelonge rezignis lukti kontraŭ la gastameco de miaj novaj amikoj. Feliĉe post nelonge Gordon savis min, dirante, ke ni devas ekflugi plej eble baldaŭ. Kompreneble ĝis tiam mi estis preta mem flugi la aviadilon, eĉ de la ferdeko, se necese, sed Gordon tre ĝentile rifuzis mian proponon! (al paĝo 12):

(La titola konstato estas fakto sufiĉe konata, kaj la Esperantistaro havas ĝustan imagon pri la karaktero de la aŭtoro de Esperanto. Tamen estas tre edife konvinkigi pri tio legante la pruvojn, kiujn kompetente kolektis la konata zamenhofologo Adolf HOLZHAUS).

1. El la unua Esperanto-libro (26.7.1887). Z. skribas: Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.
2. El letero de 9/21.5.1896 al Paul Nylén: Kun plezuro mi permesas al vi preni el ĉiuj miaj verkoj tion, kiom vi volas.
3. El letero de 18.7.1905 al Bourlet: Al s-ro Breton mi respondis hodiaŭ, ke por lia deziro pagi al mi la kostojn de vojaĝo mi lin kore dankas, sed ke akcepti tion ĉi mi ne povas, ĉar mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne por mia propra mono.
4. El letero de 27.12.1912 al B.E.A: Preni ian pagon pro la frazoj, kiujn fraŭlino Fryer ĉerpis el mia Ekzercaro por sia lernolibro mi absolute NE konsentas. Mi kore dankas la konsilantaron de via asocio pro ĝia decido sendi al mi pagon, sed tiun pagon mi akcepti ne povas.
5. E. Privat, en "Vivo de Zamenhof", 1920, p. 92, rakontas: Klientoj pagas nur 40 kopekojn - kelkaj eĉ nenion.
6. N.B. Havkin en la artikolo "Alexander Silbernik" skribas: La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage.
7. Kazimierz Tyminski ĉeestis enterigon de nia Majstro. En artikolo Ĉe la Tombo li skribas: Malantaŭ la ĉerko formiĝis multnombra sekvantaro, kiu grandparte konsistis el popolamaso, loĝanta en la hebrea kvartalo; videble la onidiroj, pri tio, ke la Majstro senpage kuracis kaj helpis malriĉulojn, estas pravaj.
8. Anatolo Koch en "Miaj rememoroj pri d-ro Zamenhof" rakontas: D-ro Zamenhof estis sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉaj malsanuloj. (Nuntempa Bulgario, n-ro 12, Dec. 1958, p.22).
9. Emilian Loth en siaj Rememoroj pri Z. skribis: Zamenhof ne estis materialisto kaj kiel okulkuracisto li ofte kuracis malriĉulojn tute senpage. (Pola Esperantisto, n-ro 6, Nov., 1959, p.4).

- El "Hungara Vivo".

Kiel vi scias, mi estas fervora naturamiko kaj unu el la plej grandaj deziroj ĉiam estis, ke mi iam povu viziti Afrikon por partopreni safarion. Antaŭe, safario estis vojaĝo dum kiu oni ĉasas, sed nuntempe oni ĝenerale ne plu ĉasas per pafilo, sed per foto-aparato.

Mi vivas tre modeste - tiel mi sukcesis ŝpari iom da mono kaj tiel feliĉe pasintjare povis realigi mian revon. Vere estis impresa sperto travagi la arbarojn kaj savanojn kaj pristudi la vivon de la bestoj, kaj mi longe povus paroli pri tio. Nur unu sperton mi ĉi tie rakontos al vi.

Dum iu nokto ni loĝis en kabano ĉe la rando de savano en regiono kie troviĝas multaj sovaĝaj bestoj. Dum la nokto ni vekiĝis pro terura bruo. Ni ellitiĝis kaj rigardis tra la fenestro. Feliĉe la nokto ne estis tre malluma, ĉar la luno brilis sur la stelo-plena ĉielo.

Ni vidis cervon, kiu venis manĝi de la arbustoj apud la kabano. Sed samtempe du rabobestoj venis ataki la cervon: granda, flav-bruna leono kaj malpligranda sed forta kaj vigla tigro. Dum pli ol horo ili interbatalis, ĝis fine la tigro malaperis. La leono tamen ankaŭ ne havis multe da feliĉo, ĉar dum la batalo la cervo kompreneble malaperis ...

Jes, tutsimpla rakonto. Tamen ĝi entenas sufiĉe grandan malveron, eĉ intencitan. Do, denove tralegu kaj, ĝin trovinte, sendu vian solvon al nia sekretario, sed al tio ni altrudas la kondiĉon, ke la solvon devas akompani ia kontribuaĵo via por B.E., ĝi estu rakonto, raporto, eĉ poemeto, aŭ kio ajn alia, ĉar ni eltiros numeron el ĉapelo por trovi bonŝancan gajninton de libro-premio. Kompreneble ne rajtas partopreni solvo sen akompananta kontribuaĵo. Ensendu tiom da solvoj, kiom vi deziras, sed ĉiun akompanu aparta kontribuaĵo! Ekla! Al la enigmo-solvado!!

+++++

Pri ŝtel' akuzis lupo vulpon,
la vulpo negis tiun kulpon.
Do ili petis la simion
eldiri juĝan opinion.
Ĉi tiu diris juĝodone:
"Se mi vin ambaŭ konas bone,
vi, lup', verŝajne repostulas
ion senrajte, ĉar senperde;
vi, vulpo, negi ne skrupulas
ŝtelon faritan preskaŭ certe".

- Ezopa Saĝo.

TRILINGVA ARTIKOLO.Spray withers Dagga.

South Africa's multi-million rand dagga industry is to be killed off - with poison.

Police have disclosed that they are to spray all future crops with poison. The deputy CID chief for South Africa Major-General C.F. Zietsman said one policeman with a spray pump would now do the work of 76 policemen. Thousands of man-hours would thus be saved.

The decision comes after months of experimenting by the police and the Council for Scientific and Industrial Research. The new poison - a crop spray - will not harm people should they smoke the affected weed.

General Zietsman would not disclose the name of the spray but stressed that it did not poison the soil and did not harm other crops.

The sprayed dagga plant withers and dies in a day. Within three weeks the plant becomes a brown, sunburnt twig.

Areas in Natal and Northern and Eastern Transvaal, which previously yielded tons of dagga each month, are expected to become bare of the plant.

SPRUCAJO VELKIGAS HASISON.

La sudafrika multmillionranda haŝiŝ-industrio estas elrad-
ikigota - per veneno.

La polico rivelis, ke ili ŝprucigos ĉiujn estontajn rikol-
tojn per veneno. La Vic-ĉefo de la sudafrika detektiv-
servo, major-generalo C.F. Zietsman diris, ke unu policis-
to kun ŝprucigilo nun povus fari la laboron de 76 policis-
toj. Miloj da laborhoroj tiel estus nun ŝparitaj.

La decido venas post multmonata eksperimentado de la pol-
ico kaj la Kuncilio por Scienca kaj Industria Esplorado.
La nova veneno - porrikolta ŝprucaĵo - ne difektos homojn,
en la okazo se ili fumos la infektitan herbaĉon. Generalo
Zietsman ne malkaŝus la nomon de la ŝprucaĵo sed emfazis,
ke ĝi ne venenigis la grundon kaj ne difektis aliajn kres-
kaĵojn. La ŝprucigita haŝiŝ-planto velkas kaj mortas en
unu tago. En la daŭro de 3 semajnoj la kreskaĵo fariĝas
bruna, sunsekigita vergo.

Terenoj en Natalo kaj Norda kaj Okcidenta Transvalo, kiuj
antaŭe produktis tunojn da haŝiŝo ĉiumonate, kredeble sen-
iĝos de la kreskaĵo.

Suid-Afrika se daggabedryf ter waarde van miljoene rand gaan vernietig word - met gif.

Die Polisie het bekendgemaak dat hulle alle toekomstige oeste met gif gaan bespuit. Die adjunk-hoof van die Speurdiens van Suid-Afrika, genl.-maj. C.F. Zietsman, het gesê een polisie-man kan nou met behulp van 'n sproeiomp die werk van 76 polisiemanne verrig. So sal baie man-ure bespaar kan word.

Die besluit is na maande van proefneming deur die Polisie en die Wetenskaplike en Nywerheidsnavorsingsraad geneem. Die nuwe gif - 'n oessproei - is nie skadelik vir mense indien hulle die aangetaste onkruid wel sou rook nie.

Genl. Zietsman kon nie die naam van die sproei bekend maak nie maar het beklemtoon dat dit nie die grond vergiftig en skade aan ander oeste sal aanrig nie.

Die besproeide daggaplant verdor en vrek binne een dag. Binne drie weke is die plant 'n bruin sonverskroeiende tak.

In gebiede in Natal en Noord- en Oos-Transvaal waar voorheen tonne dagga per maand opgelewer is, sal die plant na verwagting heeltemal uitgeroei word.

+++++

CU PEKO?

Al pastro iris, al konfeso,
 Koketulino ne plu juna
 Kaj longe petis pri forgeso
 Por bagatelo plej komuna.
 "Ne grave" diris tuj konsole
 La pia vir' kun pacienco,
 "Ĉu tiajn negravaĵojn sole
 Riproĉas via konscienco?"
 Afekte tiam kaj kokete
 La pekulino eksopiris,
 Kaj pli mistere, pli sekrete
 Si al la sankta viro diris:
 "Vanteco estas la makulo,
 Ĉar honte, pente mi konscias,
 Ke min vidante en spegulo
 Mi min tre bela opinias!"
 Kaj flustre per pintita beko
 Si petis lin pro pentofaro,
 "Sed tio ja ne estas peko!"
 La pastro grumblis, ... "nur eraro!"

NOVJORKO: Esp.º Premgrupo frontas UN. En Decembro 1979 malfermiĝis en Novjorko centro por progresigo de Esp.º - ĉe Placo de Unuiĝintaj Nacioj, tuj kontraŭ tiu moderna babelturo, la sidejo de UN. La nombro de lingvoj uzataj ĉe UN kaj ties filioj ne ĉesis kreski. Oficiala enketo montris, ke la jara kosto de lingvaj servoj estas pli ol cent milionoj da dolaroj. Estus eble draste tranĉi tiun elspezon per grada enkonduko de neŭtrala lingvo. **

UNESKO: Dum la lastaj jaroj UEA vigle kunlaboris en la diversaj kampanjoj de Unesko, dum tiu ĉi eldonis plurajn dokumentojn en la Int. Lingvo. En 1977 la Ĝenerala Direktoro, Amadou-Mahtar M'bow, ĉeestis la Universalan Kongreson kaj esprimis la interesigon kaj subtenon de lia organizaĵo por la agado de UEA. Esperanto celas ebligi rektan komunikadon sen interpretistoj. **

TITO DISTINGIS Esperanto-organizaĵon okaze de la 30jara fondiĝo kaj sukcesa agado de la Int. Lingvo ĉe la Esperanto Ligo de Bosnia kaj Hercegovina en Jugoslavio per la Ordeno kun Arĝenta Stelo pro meritoj por la popolo. Dum la solenaĵo estis ankaŭ transdonitaj rekonoj de la Esp. Ligo al ties 47 meritplenaj aktivuloj kaj organizaĵoj. **

PROF. RALPH A. LEWIN, la usona esperantisto kaj oceano-biologo kaj lia edzino, Lanna Cheng, vizitis Ĉinion dum la unuaj dek tagoj de Aprilo. Dum vizito al Pekino li kunsidis kun tieaj Esperantistoj. Prof. Zhou Yao, ĉina entomologo, speciale veturis de Ŝenhi provinco por intervidiĝi kun li.

Alispeca novaĵo: Instruisto de lingvoj en Anglio kelkfoje faris amkonfeson al knabino. Ŝi ĉiam rifuzis ĝin. Sed li decidis doni veran pruvon pri sia amo. Li komencis sendi al ŝi leterojn kun nur unu frazo: "Mi amas vin", skribita en ĉiu letero en alia lingvo. Kiam la knabino ricevis leteron kun tiu ĉi amkonfeso en la cent dekdua lingvo, ŝi decidis fariĝi edzino de la instruisto. Bedaŭrinde, ĉu inter la 112 lingvoj estis ankaŭ Esperanto, oni ne informis. **

Nova spritaĵo: En teatro oni ludas la dramon de Shakespeare "Rikardo la Tria" (Richard III). La ĉefrolulo ĵus estas ekkriinta: "Ĉevalo, ĉevalo, mian reĝolandon nur pro unu ĉevalo ...!" El la galerio homo, opiniante sin tre sprita, ekkrias: "Ĉu sufiĉus azeno?" La aktoro tuj respondas: "Jes, bonvolu tuj veni ĉi tien!"

Ges-roj Small en antaŭurbo de Kaburbo ege ŝatus scii ĉu nerompeblaj teleroj, ktp., foje tamen havas ian difekton, aŭ ĉu temas pri koboldoj aŭ alispecaj supernaturaj estaĵoj. Pelvo en kiu troviĝis la restaĵo de la ĵusmanĝita vespermanĝo ŝajne senkaŭze eksplodis. Tuj antaŭ la eksplodo la lumoj subite estingiĝis kaj poste tuj ekbrilis. Alian fojon dumnokte laŭta eksplodo venis el la kuirejo. La postan matenon, interne de fermita ŝranko, s-ino Small trovis la disĵetitajn pecojn de eksplodiginta telero. Nenio estis falinta sur ĝin. **

Hina kafejposedanto de Port Elizabeth kune kun lia edzino troviĝis solaj en sia kafejo kiam tri mafianoj eniris kaj postulis monon. Unu senaverte pafis al la hino sed la kuglo nur forsaltis de lia brusto. La superstiĉaj fiuloj forkuris ĉar ja temas pri homo nevundebla. Sed minutojn poste ili revenis, tamen trovis la hinkun pistolo enmane, starantan preta por ilin ĉiujn mortpafi. La nevundebleco? Pro iu kaŭzo li havis kelkajn monerojn en sia ĉemizpoŝo kaj la kuglo frapis ilin! **

En Nairobi, Kenya, magistrato sendis homon, kiu prirabis butikiston, malliberejen por 34 jaroj, aldone ordonis, ke li ricevu 60 vergobatojn. Helpinto, kiu ne antaŭe krimis, ricevis 20 jarojn kaj 50 vergobatojn. Pro multa krimado la estraroj estis devigitaj apliki ege severajn punojn. **

Homo en Parizo, Francio, tiel koleriĝis kiam hundo mordis lian edzinon, ke li mordis la posedanton de la hundo. Ambaŭ gemordituloj poste estis kuracitaj en malsanulejo. **

Multaj homoj nuntempe parolas por kaj kontraŭ 'diskriminacio'; eĉ la plimulto ĝenerale ne kapablas difini tiun ĉi modernan koboldon... Laŭ novaĵo el Geneve troviĝas homoj kiuj opinias, ke ĉiuj tiuj specialaj leĝoj kiuj protektas virinojn estas diskriminacio kontraŭ la virinaro. **

Ĉe Stellenbosch homo fotografis trafikpolicistojn kiuj ĉe vojflanko funkciigis rapidec-mezurilon por monpuni pekantojn. De tio sekvis, ke li devis pagi monpunon de R40 pro tio, ke li 'genis' la trafikistojn. Vidante lin tie fotografi, preterpasantaj veturigistoj malplirapidiĝis, por vidi kion interesan li estas fotografanta, kaj, tiel farante, ili ne bezonis mone subteni la urbestraran buĝeton. **

Laŭ deklaro de Reuben Kamanga, Zambia ministro de Kampara Evoluigo an la parlamento, la departemento esploras la eblecojn komerce vendadi simian viandon. **

(Ĉerpitaj el diversaj fontoj; ensendis E.S. Venter).

+++++

BRAZILO. Fine de la pasinta jaro Brazila Konsilantaro de Esp.o aĉetis propran sidejon en la ĉefurbo Brasilia. Ĝi servos ankaŭ kiel oficejo por la LKK de la 66a UK, 1981.

BRITIO. 45 kandidatoj el Skotlando ĉe la lasta baloto por la parlamento favore respondis al demandoj pri la Internacia Lingvo. En Stratford-on-Avon la vidindejo "The World of Shakespeare" nun disponas pri gvidfolioj en Esp.

HISPANIO. Pli ol 800 personoj en la tuta lando lernas Esp.on pere de la Korespond-kurso de la hispana sekcio de ILEI.

HUNGARIO. Dum la jaroj 1978 & 1979 Hungara Esp. Asocio eldonis 23 librojn en Esp.o, 13 originale verkitaĵoj.

IRANO. S-ro M. Gassabzadeh gvidas 4 kursojn, inter kiuj unu en la teherana moskeo "Haĝ-amĝad".

ISRAELO. Oni instruas klasojn en Tel-Aviv por progresantoj en la klubejo kaj en la klubo de pensiuloj.

KANADO. S-ro C.E. Carson donacis al Kanada Esperanto-Asocio la sumo de 50 000 Kan. dolaroj.

SOVETUNIO. D-ro A.N. Bogdanov, Kiev, organizis fine de la pasinta jaro jam la trian Esperanto-rondon ĉe la Ukrajna Akademio de la Sciencoj.

SRILANKO. Fondiĝis Esperanto-grupo gvidata de s-ro D.B. Jesudason (71, Pagoda Rd., Nugegoda, Srilanko). La grupo ĝojus ricevi legaĵojn, komencinte kun preskaŭ nenion.

SVEDLANDO. La gazeto "La Espero" dediĉis specialan tre belan numeron al la jubileo "Naŭdek Jaroj de Esperanto en Svedio, 1889-1979. En 1889 aperis la unua sveda lernolibro de Esp.o: Dr. Esperanto. Eldonis L. Zamenhof.

USONO. Lastan aŭtunon 300 personoj partoprenis en San Diego, Kalifornia, en dulingva diservo en la First Unitarian Church. Esperantistoj alparolis la ĉeestantojn en la angla kaj en Esperanto kaj ĉiuj kune kantis la finan himnon en Esperanto. Kvankam je la komenco multaj eĉ ne sciis kio estas Esperanto, je la fino ĉiuj unuanime akklamis la diservon kiel homaranisman sperton. Predikis David Jordan, antrpologo kaj Esperanto-instruisto, pri la temo "Mal-babeligado". Rezulte de tio multaj personoj petis informojn kaj kelkajn poste ekfunkciis tri kursoj. **

+++++

De paĝo 5: Post 15 minutoj ni rigardis malsupren; sube estis longa, rekta, blanka streko de bordondoj, kiuj malaperis en la nebuleton antaŭe; maldekstren, bluj maro kaj ĉielo kunfandiĝis; dekstren, oraj dunoj etendiĝis ĝis la horizonto. Tiel komenciĝis nova kaj eventoplena ĉapitro en mia vivo. (Daŭrigota). J.C. O'C. O'Shea

En Nederlando oni ĉiujare manĝas pladon da terpomoj, bulboj kaj karotoj kiel kvazaŭ nacian pladon. Tio okazas en la 3a de Oktobro, kiam preskaŭ ĉiuj nederlandanoj prenas tiun manĝaĵon.

La 26an de Majo, 1574, hispanaj trupoj ĉirkaŭis la belan, nederlandan urbon Leiden. La loĝantoj de la urbo petis helpon de iu princo. Tiu ĉi konsentis helpi sed postulis, ke ili persistu rezisti tri monatojn, por ke li havu tempon por ekipi siajn militŝipojn.

La loĝantoj en Leiden rezistis 90 tagojn, sed ne alvenis la helpa trupo. Elĉerpigis la municio kaj greno en la urbo, sed ankoraŭ ne aperis la helpa militŝiparo. Tamen la princo alsendis leteron al Leiden, sciigante, ke li intencas breĉi la digon de kanalo, por ke la ŝiparo povu veturi rekte al la urbo, sed la inundakvo profundis nur kelkajn centimetrojn, pro kio la plano fiaskus. Por ne fariĝi militkaptitoj, la Leidenanoj persistadis rezisti, malgraŭ la turmentoj de la malsato.

La 2an de Oktobro pluvegis la tutan tagon, kaj ĉie la akvo profundis unu metron. Fine la ŝiparo de la princo povas alveturi! Informiĝinte pri tio, la hispanaj trupoj tuj retirigis de Leiden. Rimarkinte ilian evakuon, la enloĝantoj tuj ĵetis sin al iliaj pozicioj kun la sola deziro trovi manĝaĵojn. Sed la hispanoj forportis ĉion bongustan, postlasante nur terpomojn, bulbojn, karotojn kaj aliajn, krudajn manĝaĵojn. Ili do kunmetis ĉiujn tiujn ĉi en kaldronojn kaj, post kuirado, ekmanĝegis. Tio okazis vespere, 3an de Okt., 1574.

PLUVA ARBO.

Se vi promenas sur bulvarado de la urbo Kolombo, en somera tagmezo, vin povas subite trafi pluvo, kiu malsekigos viajn kapon kaj piedojn. Sed se vi malfermos vian ombrelon aŭ provos trovi lokon por vin ŝirmi kontraŭ la neatendita pluvo, vi konstatos, ke la ĉirkaŭaĵo estas seka, kaj ke la suno forte brilas sur la ĉielo. Do, kiu mirinda fenomeno?!

Tiun 'duŝon' donas la 'pluva arbo' de Sri Lanko. La folioj de tiu arbo longas pli ol futon. Simile al la floroj en la fabelo de Hans Andersen, ĝiaj kavaj folioj kun elstara rando, povas kliniĝi malsupren aŭ sin etendi. Kiam vesperiĝas, ili komencas sorbi vapbrigintan akvon el la aero. Tagmeze, kiam brilas la suno la ĉeloj de la folioj pro varmego ellasas akvon kaj surprizas preterirantojn per duŝo, kiu tamen estas refreŝiga kaj agrabla. ** - El 'Informa Letero' de PEA.

Lernis Esperanton en 1973 kiam 40-jaraĝa en kurso de s-ro H. Appel. Ĉeestis en 1974 la UK-on en Hamburgo. Naskiĝis al Prusa militfaka familiĉeno, iris lernejon en orient-Germanio, centon da k. metroj oriente de la nuna DDR, nun en Pollando, kaj post ties kolapso en 1945 en okcident-Germanio. Ekde 1949 ekloĝis en Grahams-town, kie la 8-kapa familio havis bienon. Studis agrikulturon ĉe Stellenbosch kaj Pietermaritzburg. Edziĝinta, loĝas proksime de Johannesburg. Aktivas por universitataj Esp.o-kluboĵ. Hejmlingvoj estas la Afrikansa kaj la Germana. Lia laboro - la evoluado de agrikulturaj ĉemikaliĵoj - kondukas lin ĉiudirekten, en multajn angulojn de la subkontinento. **

ELEKT=PERMESO EN SVEDAJ LERNEJOJ: Ekde Aŭgusto 1981 la lernantoj de 12 lernejoj en Stokholmo estos permesataj libere elekti kiu el inter la franca, germana aŭ angla estos ilia unua fremdlingvo. Antaŭe la angla estis la sola deviga fremdlingvo de post ilia naŭjaraĝo kaj kiam ili estos dektriaĝaj, la lernantoj rajtos plue alpreni laŭvole la francan aŭ la germanan.

RETROIRA PASO: Internaciaj forumoj konsistantaj el ŝtatoficistoj pli kaj pli multe decidis detrui tion, kion iliaj antaŭuloj dum penega evoluado starigis. La Universala Poŝt-unuiĝo antaŭ nelonge eksigis fondmembron Sudafriko! Ĝis nun feliĉe UEA ankoraŭ difinas la vorton 'universala' malnovstile. Niaj eksterlandaj amikoj daŭrigas sendi al ni Internaciajn Respondkuponojn, sed la Sudafrika poŝto bedaŭrinde ne plu rajtas pagi ilin - pro la eksigo. **

(La ĉi-suprajnensendis A. von Blottnitz).

Okazis foje en Rostock dum naĝkonkurso, ke dum la finalo de la 1500 rapidnaĝo unu el la sportistoj perdis sian bankalsonon tuj post la starto. Sed li ne ĉesis naĝi. En la rezult-listo oni anoncis lin en la dua loko. Tamen tio ne estis ĝusta. Laŭ la reguloj de la Naĝista Federacio la naĝisto devas esti vestita per bankalsono. Se li perdas ĝin, oni devas lin ekskludi.

Sporto estas unu el tiuj amasmovadoj kiuj havas plej multe da internaciaj rilatoj. Tio signifas, ke ankaŭ la sportistoj bezonas komunan lingvon. **

En B.E. de Aŭgusto 1978 aperis listo de 63 libroj, kiuj troviĝas en la urba biblioteko JHBa. Ĝis nun mi prunteprenis kaj legis 25 el ili, do ĝojis ekscii de s-ro J. Semmelink, ke li donacis Esperantaĵojn al la urba biblioteko de Pretoria. En la biblioteko sur la teretaĵo sub la numero 499,992 vi trovos:

1. Bakker, Hans: Waarom zou ik Esperanto leeren (24 p.)
2. Cawley, C.C.: Pri la Iamaj Tasmanianoj (10 p.)
3. De Hoog, H.A.: Nia Historio (KELI de 1911-1961) (159 p.)
4. Drummond, Henry: Kvin Paroladoj (elangligis A.Maloney (85 p.)
5. Durrand, E.D.: The Language Problem. History & Solution (168 p.)
6. Edinburgh Pocket Dictionary (2 ekzempl.) (288 p.)
7. Glück, Julius: Klasika Periodo de Esp-o. Grabowski, Kabe (36p.)
8. Glück, Julius: Jubilea Kong. de Esp-o, 1912 (36 p.)
9. Hauf, Wilhelm: La Karavano (elgermanigis Eggleton, J.W. (99 p.)
10. Kongresa Universitato de la 38a Kongreso Japana (43 p.)
11. Kreuz, A. & Mazzolini, A.: Komerca Vortaro de Esp-o (95 p.)
12. Lermontov, M.J. & Sibirjak, M.: Rusaj Noveloj/Filatov (32 p.)
13. Malmgren, E.: La Esperanto-Klubo (48 p.)
14. Molnar, F.: Knaboj de Paulo-Strato (elhungarigis Spierer (187p.)
15. Privat, E.: Tragiek & Triomf de Z. (elesperantigis s-ino L. Belinfante-Ahn) (130 p.)
16. E. Privat: Life of Zamenhof (elangligis R. Elliot) (123 p.)
17. Robbie, J.: The Esperanto Home Student (4 ekz.) (64 p.)
18. Rosenberg & Malmgren: Per kio Ni Amuzu Nin. Ludoj. (40 p.)
19. Scherer, J.R.: Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo (34 p.)
20. Shakespeare, W.: Hamleto (trad. L.L. Zamenhof) (176 p.)
21. Svensson, Jan: Noni & Mani (trad. P.v.d. Hovel) (160 p.)
22. Trobisch, W.: Mi Amis Junulinon (140 p.)
23. UEA Jarlibroj de 1973 kaj 1974 (368+352 & 352+320 p.)
24. Veen, A.: Wat Wy Doen (20 p.)
25. Wirgen, W.H.: Esperanto in Der Tasche (44 p.)

Dependas de ni - la legantoj - ĉu la libroj restos sur la bretoj antaŭ la okuloj de la publiko, aŭ ĉu oni kaŝos ilin en malseka kelo. Espereble aliaj legantoj sekvos la malavaran ekzemplon de s-ro Semmelink. Se ni montros sufiĉan intereson pri la libroj, eble ni sukcesos persvadi la bibliotekon aĉeti novajn titolojn laŭ niaj konsiloj kaj sugestoj!

Oskaro Sher.

Libroj kaj amikoj devas esti malmultaj kaj bonaj. **
Ne gravas kiom da libroj, sed kiel bonaj estas viaj libroj. **

PRI LA ORIGINO DE "EDZIN" .

En "Israela Esperantisto", majo 1979, aperis longa, interesa artikolo pri la supra temo. En 1958 nia senlaca samideano N.Z. Maimon skribis al "Jidiŝe Sprach" (Jida Lingvo), organo de la supera jida scianca instituto "Yivo" en Nov-jorko. La kerno de lia demando estis: "Ĉu ekzistas en la jida lingvo la sufikso ECIN? Se jes, de kie ĝi devenas? Mi konas nur unu solan vorton: REBECIN (edzino de Rabeno).

La demando leviĝis inter E-istoj. Zamenhof elektis la finaĵon EDZIN por indiki virinon edziniĝintan ... Z. mem respondis al demando pri tiu sufikso, ke li tiris ĝin el KRONPRINZESSIN. Lastatempe iu rimarkigis, ke la sufikso ECIN troviĝas en la jida kaj Zamenhof tiris ĝin rekte el tiu lingvo. Estas konate, ke ekde sia juneco Z. forte amis la jidan lingvon ... Verŝajne li havis ian kaŭzon por diri, ke li prenis tiun sufikson el la germana, sed KRONPRINZESSIN estas ofte virino ne edziniĝinta, eĉ juna knabino."

La redaktoro de "Jidiŝe Sprach", Judl Mark, tre detale diskutis tiun demandon kaj fine diris jenon: "Nu, el la supraj klarigoj vi povas elekti tiun, kiu plaĉas al vi, sed staru firme sur tiu, ke -EDZIN en Esperanto devenas de REBECIN".

S-ro Maimon plue atentigas: "La literon c Zamenhof ŝanĝis al dz (edzino, edzo), ĉar ECO li destinis pro esprimi KVALITON".

- Brita Esperantisto.

+++++

Pri "PO" .

La vorto "po" antaŭ iu esprimo de mezuro signifas, ke tiu mezuro rilatas ne al ĉiuj personoj aŭ objektoj KUNE, sed al ĉiu APARTE; ekzemple: ili ricevis po kvin pomoj = ne ĉiuj kune ricevis kvin, sed ĈIU el ili APARTE ricevis kvin pomojn; la drapo kostas po du spesmiloj por metro = ĈIU METRO (ne la tuta drapo) kostas 2 spesmilojn; ili vendas pogranda = ĉiu aparta porcio, kiun ili vendas, estas granda (t.e., ili vendas nur grandajn porciojn). Oni ne povas diri "je 80 centimoj po funto" aŭ "30 mejlojn po horo", sed oni devas diri "po 80 centimoj por (ĉiu) funto", "po 30 mejloj en horo".

Lingvaj Respondoj, L.L. Zamenhof .